ĈEA-retkomunikoj 4/2004

CxEA-retkomunikoj estas neregula dissendolisto de Cxehxa Esperanto Asocio por informi siajn membrojn kaj pliajn interesatojn en (kaj ekster) Cxehxio. Por malaligxi suficxas sendi mallongan mesagxon al chrdle@kava-pech.cz

ENHAVO:
1. Tre favoraj kondicxoj por partopreni la Internacian Paroligan Semajnon
2. La kultura festivalo en Ústí tamen okazos
3. Omagxo de ora duopo en Brno
4. Invito al Poludnica
5. Alvoko por la organizantoj de Esperanto-arangxoj

1. TRE FAVORAJ KONDICxOJ POR PARTOPRENI LA INTERNACIAN PAROLIGAN SEMAJNON.
De la 29-a de novembro gxis la 5-a de decembro okazos Internacia Paroliga Semajno en Dobřichovice apud Prago, kiun partoprenos deko da aligxintoj el Francio, Belgio, Slovakio kaj Cxehxio. La luprezo de la salono kaj la ceteraj fiksaj kostoj tamen jam estas kovritaj, ni do ebligas eksterordinare al la lastminutaj aligxintoj partopreni sen devi pagi la kotizon, do oni pagos nur la favorprezan tranokton (tamen cxiu cxambro havas propraqn dusxejon kaj necesejon) kaj mangxojn. Oni estos disdividitaj en du grupojn, tiuj, kiuj estas komencantoj, aux moderaj progresintaj, havos kurson de Esperanto gvidatan de Stano Marcxek, progresintoj havos paroligan seminarion gvidatan de Petro Chrdle. Ambaux grupoj antauxtagmeze lernos en salonoj kaj posttagmeze dum promenoj tra Prago, Karlątejn, ktp. Pliaj informoj cxe chrdle@...

2. LA INTERNACIA KULTURA FESTIVALO EN ÚSTI TAMEN OKAZOS
en pasintaj retkomunikoj ni anoncis, ke la IKF en Ústí nad Labem estas nuligita pro malsanigxo de la cxeforganizanto Miroslav Smyčka. Li jam estas denove sana, pro kio ni gxojas kaj ni povas anonci, ke la festivalo okazos, nome de la 10-a gxis la 12-a de decembro lige kun la Cxehxa-Sachsa Tago. Inf.: Miroslav Smyčka <m.smycka@...> aux Jozefo Kříľ, <ingjopek@...>.

3. OMAGxO DE ORA DUOPO EN BRNO
La 4-an de decembro la Brnoaj esperantistoj kun gastoj omagxos du grandajn esperantistojn Josef Vondrousek kaj Vilibald Scheiber. Pli da informoj pri la programo kaj loko de la solenajxo vi trovos cxe http://www.medy.cz/Brno%2DEsperanto/indekso.htm Pli da informoj: podhradska@...

4. INVITO AL POLUDNICA
De la 7-a gxis la 9-a de januaro okazos renkontigxo en Liptovský Ján (SK), kies cxefa programo estas jam tradicia vintra grimpado al Poludnica, sed krome ankaux ricxa prelega matineo kaj amuza programo. Pli da informoj kaj aligxiloj cxe janvajs@...

5. ALVOKO POR LA ORGANIZANTOJ DE E-ARANGxOJ

Mi ripetas la alvokon de la pasintaj retkomunikoj. Cxar ni ricevis tre malmulte da sciigoj pri venontjaraj arangxoj, ni ne aperigas la kalendaron nun, sed nepre volas aperigi gxin ankoraux cxijare! Ke temu se eble pri kompleta kalendaro de la E-arangxoj en Cxehxio kaj en proksimaj regionoj de najbaraj landoj, ni devas pri la arangxoj scii! Cxiuj organizantoj do estas petataj sendi bazajn informojn pri la preparata arangxo (nomon, lokon, daton, kontaktadreson) al chrdle@kava-pech.cz, cxar nur de vi dependas, cxu la kalendaro estos vere kompleta aux ne.